

SANO

JARKOLEKTO 1985

NUMERO 1

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Medicinistaj kolektoj - S A N O – jarkolekto 1985 – numero 01 - Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, ĝeflegistoj kaj ruĝkrucaĵoj.

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicinista sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto

Redaktas: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 718, Ĉeĥoslovakio
Grafika kunlaboranto : Jaroslav Klement, Karlovy Vary

KIAMANIERE ABONI NIAN CIRKULERON :

BULGARIO: BULGARIA ESPERANTISTA ASOCIO, Chr. BOTEV 97- Sofia

ĈSSR: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA

G D R : Margit Volkmann, Zittau, Gubenstrasse 19, GDR

HUNGARIO: D-ro ISTVANE GAJZADA, Kozalvi Mihaly u. 4/8, 1053 BUDAPEST

JAPANIO : SABURO YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9
GUNNA-KEN

POLLANDO: STEFANIA WOJCIECHOWSKA, 78-320 POLCZYN YDROJ, ul. 1.
Maja 3/3

UEA : UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO? NIEŬWE BINNENWEG 179, BJ
3015 ROTTERDAM, NĒDERLANDO

USA : BERN VHEEL, BOOKS, 834 WENONAH, OAK PARK, IL 60304

MODERNAJ ĤEMI-ANALIZAJ METODOJ EN MEDICINO - XI.

Ĝeneralaj perspektivoj

Ing. Zdenĕk Pluhař

Per la sekvantaj linioj finiĝas nia artikol-serio pri la modernaj ĥemi-analizaj metodoj aplikeblaj en medicino. Oni povis jam dum la aperigado de unuopaj artikoloj diskuti pri tio, ĉu tiu aŭ alia metodo estas ankoraŭ "moderna", aŭ jam "klasika", por prezenti aŭ ne prezenti ĝin en la artikolaro, eventuale ĉu tiu aŭ tiu metodo ne estas ankoraŭ tro nova por paroli pri ĝi kiel pri ilo de la medicinaj diagnozo kaj terapio. Kvankam la elektro kaj akcentado de unuopaj metodoj povas esti iom subjektiva afero, la skribinto esperas, ke li sukcesis prezenti koncizan resuman supervidon de relative modernaj kaj malpli konataj ĥemi-analizaj metodoj, kiuj jam havas, aŭ baldaŭ havos, sian lokon en medicino. La sciigoj estis destinitaj al la fakuloj ekster la klinika bioĥemio kaj higiena analiza ĥemio - ĉi tiuj fakuloj estu informitaj pri tio, kion ili povas atendi kaj eventuale postuli de la medicina aplikita instrumenta analiza ĥemio.

Vice da ĥemi-analizaj metodoj ne estis prezentita inter la "modernaj" metodoj. Temas ekz. pri flama fotometrio kaj spektrofotometrioperoj en infraruĝa /IR/ kaj precipe videbla /VID/ kaj ultraviola /UV/ spektroj. La verkinto tute ne volis per tio deklari, ke tiuj metodoj jam ne havas sian estontecon en medicino - ilia "nemoderneco" fontas nur el tio, ke ili jam estas vaste konataj kaj aplikataj. Cetere ankaŭ la klasifikado "instrumenta kaj neinstrumenta" ĥemiaj analizoj estas nuntempe tre relativa. Ankaŭ "klasika neinstrumenta" analiza ĥemio estas nun realigata kutime per instrumentoj, iam sufiĉe komplikaj.

Temas precipe pri la volumen-mezura kaj mas-mezura/pesa/ analizoj, kiuj ĉiam havos sian rolon almenaŭ kiel kontrolaj metodoj, ekz. dum la studado de

novaj analizaj procedoj.

Ankaŭ ĉe la metodoj, kiuj jam transpasis kulminon de sia "ĥemia" evoluo /intensaj studado kaj eltrovado de novaj ĥemiaj reakcioj kaj fizikaj-ĥemiaj procezoj analize aplikeblaj/ oni ĉiam esploras kaj evoluigas novajn aparatajn sistemojn - te. daŭras la "instrumenta" evoluo. En la unuopaj artikoloj ne povis esti sufiĉe emfazita la vasta kaj kreskanta aplikado de mikroproceziloj kaj mikrokomputiloj en la ĥemi-analizaj aparatoj. La mikroprocezilo kaj mikrokomputila tehniko ebligas altan aŭtomatigon kaj miniatutigon de analiziloj, eventuale ankaŭ ilian plurfunkciecon. La plej modernaj ĥemiaj analiziloj kapablas memori multe da informoj /datumoj/, ordigi ilin, kompari la ĥus determinitajn valorojn kun la "normalaj" /kio precipe en medicino tre utilas/, eventuale liveri el la analizisto /diagnozisto/, pere de presilo aŭ ekrano, la skriban aŭ grafikan supervidon de indikoj. Tial la laboratorioj baldaŭ estos kapablaj rapide liveri al la kuracanto verajn diaĝnozajn instrukciojn anstataŭ la nura, ofte malfruiĝanta, amaso de ciferoj.

Sed la evoluo ne finiĝas ĉe malgrandaj komputilaj sistemoj en unuopaj izolitaj laboratorioj. En la evoluintaj landoj jam nun komenciĝas esti realaĵo a fakto, ke la analiziloj da unuopaj laboratorioj estas konektitaj kun la centraj datum-bankoj, kiuj povas memori jam vere admirindan nombron da informoj, akiritan en vico da labvarejoj. La komputiloj kapablas rapide statistike prilabori la amason da datumoj, tiamaniere helpante al la pliprecizigo de la difino, kio estas "normalaj" kaj tie "patologiaj" valoroj, kaj ĉe unuopuloj kaj ĉe la tuta populacio. La reciproka ligo inter la komputiloj en unuopaj laboratorioj kaj en la centraj medicinaj laborejoj kaj en la centraj medicinaj laborejoj multe plirapidigas la interŝanĝon de informoj inter la alte speicaligitaj laborejoj kaj la "unualiniitaj" fakuloj, kaj ankaŭ inter diversaj laboratorioj. Tiu ligo ofte realiĝas per normala telefona reto. Tiamaniere la moderna instrumenta komputilizita bioĥemia laboratorio estigas la kondiĉojn por kontentige rapida kaj senerara diaĝnozo.

Al la aŭtomatigo de laboratorioj, kaj triel al la rapidigo de analizoj, helpas ankaŭ nova evolu-direkto - analizo en kontinua fluo. La "klasika" labvormaniero estas la realigo de ĥemiaj reakcioj, necesaj por determini la analizotajn substancojn, en iu ujo, en kiu la anlaizata sistemo estas en relitava senmoveco. Analizo en la kontinua fluo /ne identigu kun la frekciigo per la fluo tra kampo!/ realigas la reakciojn en la sistemo de tubetoj, tra kiuj fluas la reakcianta sistemo. Te. la necesaj reagenzoj estas sinsekve aldonataj en la kontinue fluantan analizatan sistemon. Kiel detektiloj uziĝas, en ĉi tiuj analiziloj kun la kontinua fluo, plej ofte spektrofotometroj.

La koncize menciitan altan aŭtomatigon kaj komputilizon de la ĥemia, resp. bioĥemia, laboratorio ebligas altnivelaj modernaj ĥemi-analizaj aparatoj - analiziloj. La evoluo celas la maksimuman utiligon de la scioj kaj kapabloj de medicinaj fakuloj /sur ĉiuj niveloj/, maksimume ilin liverigonte de ĉiu rutina laboro, kiun povas fari maŝinoj.

Korektendaj preseraroj en la artikoro "Modernaj ĥemi-analizaj metodoj en medicino"

Atentemaj legantoj certe jam dum la legado de unuopaj artikoloj korektis ĉiujn evidentajn preserearojn, resp. mistajpaĝojn. Ni atentigas nur pri la eraroj, kiuj povus kaŭzi gravajn miskomprenojn aŭ termonologiajn dubojn.

Sano 3/82 - Nuklea magneta resonanco - ĝuste devas esti **zeŭmatografio** anstataŭ erara "zeŭmatografio". Ankaŭ zeŭmatografiaj anstataŭ erara "zeŭmatografiaj", ĝusta surfaco anstataŭ presita "surgaco".

Sano 4/82 - Atoma absorba spektrometrio

La ĝusta ekvacio por la leĝo de Lambert kaj Beer estas

$$A = \log I_0 = k \cdot N \cdot x$$

Sano 1/83 - Jon-selektivaj elektrodoj

La lasta parto de la ekvacio sur p. 5 devas ĝuste esti: $s_i^{z_i/z_i}$

Sano 4/83 - Gasa kaj altefika likva ĥromatografioj
la ŝemo nekalkulita/ devas esti varmorezisteco anst. erare presita "varmorezistenco!
Plue ĝuste estas respondantaj anst. presita "respondataj".

Sano1/84 - Ĝela kaj bioafineca ĥromatografioj
ĝuste estas speco anstataŭ presita "spaco".
ĝuste specifa bioafineco anst. erara "speciala bioafineco", Polimeraj nastataŭ erara
"plimeraj"
ĝuste devas esti inulino anstataŭ erare presita "insulino"

Sano2/84 yIMUNOHĤEMIO EN LA ETKVANTA ANALIZA ĤEMIO

ĝuste Biera malklaraĵo anst. erara "Biera malkaraĵo"
ĝuste inderekt ELISA anstataŭ presita "indirekta ELISA"
ĝuste koncentrecoj anstataŭ presita "koncentrecoj"

TERMINOLOGIAJ GLOSOJ

al la artikoloj "Modernaj ĥemi-analizaj metodoj en medicino"

Dum preskaŭ trijara verkado de la artikol-serio iom evoluis ĥemia nomenklaturado, precipe sub la influo de la laboroj super la tradukado de la usona lernolibro de ĝeĉnerala, organika kaj biologia ĥemio /H. S. Stoker - M. R. Siabaugh, 1981/. Ni atentigas pri la ŝanĝoj, kiuj respeguliĝis en la tekstoj.

Ekde "Sano 4/83" estas senescepte uzata la tertmino hidrokarbonoj por la kombinaĵoj de hidrogeno kaj karbono. Estis forlasita la termino "hidrokarbonidoj" /reeps. hidrokarbidoj/, estonte la sufikso -id/o estu uzata en la nomo de la elektronegativa parto de duelementaj kombinaĵoj nur tiam, kiam temas pri unu certa kombinaĵo, kies steĥiometrio estas ankaz esprimita en la nomo /per la numeralaj prefiksoj/, ekz. difera trioksido, kalcia diklorido, ks. Evitinda estas ankaŭ la termino "karbonhidrido", la termino "hidrido" estu uzata tiam, kiam hidrogeno estas en la formo de la elektronegativa, hidrida, anjono en certa kombinaĵo - ekz. natria hidrido ks.

Ni nepre akcentu la fakton, ke la termino hidrokarbonoj ne estas nescienca, tial evitinda, nomo por saĥaridoj - la lasta termino estas senescepte uzata en la artikol-serio. Ankaŭ la termino "sukeroj" estu rezervita por pli specialaj kazoj kaj ne estu uzata sinonime al saĥaridoj.

Ek de "Sano 4/83" estas uzata la neollogisma tempo neŭtrala neoficiala sufikso -enz/o, en la nomoj de substancoj, kiuj aktive partoprenas /ofte nur en konvencia senco/ en la ago /procezo, procedo, reakcio, ktp/ koncernata de la vorto-radiko. Ekz. adaorbenzo, agenco, leganzo, portenzo, reagenzo, solvenzo, ks. La sufiksa -enz/o anstataŭis la sufikson -ant/o, ĝis nun kutime tiucele uzatan /kion kritikis lingvistoj - t.e. la uzon de -ant/o por senvivaj objektoj/. La sufiksoj -enz/o kaj -anto ne estas sinonimaj! /komparu: solvantaj molekuloj x solvenzaj molekuloj/. La sufikso -enz/o pli-malpli respondas al -ant/aĥ/o. La uzado de la sufikso -il/o por la supre difinita celo estas miskompreniga, tial evitenda! La sufikso -il/o estu rezervita por nomi instrumentojn. /Ekz. solvilo ne estas solvanta substanco, sed instrumento por solvi!/
Ekde Sano 2/84 estas uzata la termino koncentreco por la nocio "enhavo de certa konsistaĵo en la sistemo/ solvaĵo, miksaĵo k.s./". En la plejparto de kazoj estas superflua la tempindiko en similaj terminoj /t.e. "koncentriteco", eventuale "koncentrateco", "koncentroteco"/.

Por nomi ĥemiajn kombinaĵojn estis en ĉiuj artikoloj unualoke uzataj la sistemaj nomoj laux la reguloj de IUPAC /International Union of Pure and Applied Chemistry/, kio estas rekomendenda por ajna faka teksto, ne nur ĥemia. Ing. Z. Pluhař

CS-507 51 Holovousy v Podkrk.109

1/ IMEK V/1985 okazos de la 8-a ĝis 14-a de septembro 1985 en urbo Schwerin /Ŝverin/, GDR. La ĝenerala temo de IMEK V/1985 estas: KUN SANA JUNULARO POR POPOLA BONFARTO KAJ PACO

Oni krome traktos ankaŭ aliajn ĝenerale interesajn medicinajn temojn kaj problemojn de medicina terminologio en Esperanto. Ĉiuj esperantistaj kuracistoj, flegistoj, farmaciistoj, veterinaroj kaj anoj de parencaj profesioj estas kore invitataj travivi ses klerigajn kaj amuzajn tagojn en internacia kolega medio.

2/ Schwerin, ravigo bela distrikta urbo norde en GDR, situas inter lagetoj kaj havas plenkonservitan mezepokan urbokernon. Ĝis estas urbo kun historia tradicio, alloga kultura nivelo kaj prezentas la plej favorajn kondiĉojn por varia programo, kiu inkluzivas: fakajn prelegseriojn /kusidojn de fakgrupoj/, viziton al medicina institucio, tuttagan ekskurson, urborigardon, muzeoviziton, dancvesperon, kulturajn prezentaĵojn kaj aliajn erojn. La plej multaj aranĝoj okazos en la Domo de Kultuligo meze en la urbocentro, kiu facile atingeblas de la tranoktejoj kaj de la stacidomo.

3/ La kotizo estas ĝis 1985-06-30 - 320 markoj - se pagata surloke 360 markoj, kaj inkluzive tri manĝojn tage, la ekskursojn, kulturajn aranĝojn kaj ĉiujn ĝeneralajn kostojn de la konferenco. La kotizo ne estas transigebla al alia persono kaj ne estas repagebla.

Pagmaniero:

a/ kolegoj el socialismaj landoj pagos la kotizojn el indikota konto aŭ surloke /tiam pli multe/

b/ kolegoj el nesocialismaj landoj pagos la kontraŭvaloron en dolaroj aŭ okcidentgermanaj markoj surloke

4/ Ni elvokas la kolegaron aktive kontrubui per fakaj prelegoj aparte al la ĉeftemo, sed ankaŭ al aliaj temoj, kiel supre indikitaj. La daŭro de la prelegoj ne superu 15 minutojn. La konfernecejo disponos pri diapozitiiva prektciilo kaj lumfolia preiktoro. La planataj prelegoj estu anoncitaj ĝis 1985-03-31. Ĉiu preleganto bv. sendi resumon /maksimume 20 liniojn/ al d-ro Giso BROSCHE, GDR-7981 RUCKERSDORF, ĝis 1985-04-30.

5/ La pago por tranokto ne estas inkluzuvigita en la kotizo. Ĉiuj partoprenanto pagos ĝin aparte al la tranokejo surloke. Petu aliĝilon, informilon pri tranoktaĵoj kaj pluajn informojn ĉe Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, ddr-1080BERLIN, Ĉarlottenstr. 60/tel. 220 29 91/

MEDICINA TAGO

La 20-an de aŭgusto 1984 kadre de la XXII-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Szczecin la Meidcina Sekcio organizis la unuan fakan konferencon, kiun oni nomis la Meidcina Tago. La aranĝo havis sufiĉe modestan karakteron, kiun oni nomis la Medicina Tago. La aranĝo havis sufiĉe modestan karakteron. Alvenis nur 20 gekolegoj, kiuj aŭskultis 4 fakajn disertaciojn, nome:

1/ La dentkario - prof. Irena Michiewicz

2/ La influo de malutilaj faktoroj al la evoluiĝanta maĉorgano - Dr Krystyna Swulinska

3/ La akno kaj aknosimilaj - kol. Irena Kijas

4/ Deskvigo de organismo dum laborado en alta temperaturo - dr Marian Luba

La estraro de la Medicinista Sekcio decidis organizi similajn konferencojn ĉiujare, enkondukante ilin kiel konstanta programero de sekvontaj landaj kongresoj.

Esperante, ke la Medicina Tago disvolviĝos estonte, ni jam nun invitas eksterlandajn gekolegojn al la 2-a, kiu okazos somere 1985 en Poznan, dum la XXIII-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso.

En la nomo de estraro dr. Marian Luba, prez.

Adreso: Pola Esperanto-Asocio
Medicinista Sekcio
PL - 75 950 Koszalin pk. 30, Pollando

REFERAĴOJ

ĈU LA HOMOJ KAPABLAS DESTINI SEKSON DE SIA INFANO?

Per tiu ĉi problemo okupiĝis sukcese doktoro Francisko Bebendo, pola kuracisto. Rezultojn de sia zorgema esploro de 33 jaroj li publikigis en la medicinista bulteno Endokrynologia Polska 1970, XXX, 3 p. 265 ĝis 273. Ĝis estis lia habilitacia laboro el la j.1965.

La homoj iam delonge sopiris elekti havi knabeton aŭ knabineton. Ĉiu tempoperiodo havis siajn superstiĉojn kaj popolajn konsilojn. Ili estis nesciencaj kaj kunigis aperaĵojn, kiuj havis nenian rilaton al la sekso de la naskota infano.

Bebendo eluzis sicencajn konojn precipe de Knause pri graveco de evolado por koncipito. Li esploris pro tio rilaton de ovolado kaj la sola fekundiga koito al la sekso de la naskota infano.

Ovolado estas ago, dum kiu liberiĝas el virina ovario la ovolo kaj ekveturas en uteron. Ovolado ekestas meze de menstrua ciklo. Do ekzemple ĉe la 28-taga regula ciklo la dekkvaran tagon. Pro tio ĉiu virino devus noti sian menstruan kalendarion.

La ovoladon oni povas destini ankaŭ per mezurado de temperaturo post vekigo. Post menstruo mezuras la virino ĉiutage malaltan temperaturon. Post la ovolado la temperaturo altiĝas je 4 ĝis 6 dekonoj de la grado kaj tenas sin ĝis la venonta menstruo, poste ĝi denove malleviĝas. De preciza antaŭdiro do la tago de la ovolado dependas destino de la tago de la koito, kiu povas destini la sekson de la infano laŭdezire. Tiel necesas sekvi kaj noti daton de la unua tago de la menstruo dum kelkaj menstruaj cikloj, eventuale ankaŭ mezuri la matenan temperaturon.

Kiam la ovolo ekveturas per salpingo, ekestas fekundiĝo, se ĝi renkontas dum 24-36 horoj spermatozoidon. Pli malfrue perdas la ovolo kapablon por embriiĝo. La spermatozoidoj tenas sian kapablon fekundigi la ovolon dum ĉirkaŭ 5 tagoj.

Ni scias jam delonge, ke la ovolo, kiu liberiĝas ĉiumonate el unua aŭ la dua ovario ne destinas la sekson de la infano. Tio dependas de la viro, kiu eligas spermatozoidojn de du specoj: unu havas seksan kromozomon Y. Koncipito ekestas, kiam unu el la sennombraj spermatozoidoj, liverigitaj dum la koito, penetras la ovolon. La fekundiĝo de la ovolo per la spermatozoido X lasas ekesti knabinon - se la ovolo fekundiĝos per la spermatozoido Y, naskiĝos la knabo.

Bebendo genie sed tre pene serĉadis virinojn, kiuj havis precizajn notojn pri sia menstrua ciklo kaj konis ĝian daton. poste li konstatis la sekson de la infano. Li pridemandis preskaŭ 40 000 virinojn, sed li elektis el ili nur 351, kies informoj estis precizaj, kaj poste li prilaboris la indikojn. La rezulto estis elstara:

1/ se la ovolo estis fekundigita la kvinan, kvaran aŭ trian tagon antaŭ la ovolado, naskiĝis 84,7% de knabinoj

2/ la knaboj prevalidis je 86,6% se la fekundiĝo dum la tago antaŭ la ovolado, en la tago de la ovolado aŭ unu tagon poste

3/ La dua tago antaŭ la ovolado eĉstis naŭtrala: naskiĝis la sama nombro da knabinoj kiel da knaboj

Bebendo provis klarigi la konstatitan fakton per teorio. Li eldiris supozon pri potencialo de la gametoj, kiu dependas de la tempo kaj de la seĉkso. Oni riproĉis al li, ke li ne povas pruvi sian hipotezon. Aliaj scienculoj bazigas la klarigon je diversa kaj malsama vivteno de la spermatozoidoj, portantaj la kromozomojn X kaj Y. Sed restis la fakto, ke la rilatoj observitaj de Beneda estas atestataj per praktikado.

Indekso de faka literaturo ĉe la kompilantino
Dr Anna Forejtová, Cs-29001 Poděbrady

INPERIESTRA TRANĈO SEN NARKOZO

estas uzata en la volgograda kuracista instituto en USSR de prof. Aleksander Ĵarkin per rekleksa nadla terapio - akupunkturo. Laŭ la agentejo APN la profesoro preparis la unuan naskon per tiu ĉi metodo dum 10 longaj jaroj kaj ellaboris perfektan metodon, kiu celas por la patrino alporti sendoloran naskon sen risko de narkozo por la feto. Ankaŭ ĉe la malnova metodo - la anestazio - ne estas problemo por la faka kuracisto, sed temas pri pronlema post enkonduko de la narkozo rapide operacii, por ke la infano estu minimume dum 3 minutoj liverigita el la korpo de la patrino. Se la nasko prokrastiĝas, la infano mortas aŭ naskiĝas kun grava difekto de la griza cerba ŝela substanco, kiu povas minifestiĝi nur pliposte dum la evoluo de infano.

"La uzo de la refleksa terapio", diras profesoro Ĵarkin, "alivorte enpiko, kiu havas anesteziajn efikojn, signifas, ke ni forigis danĝerajn sekvojn de la narkozo por la feto. En nia klibiko efektiviĝis jam ok tiaj operaioj. Kaj la novnaskito ekkriis ĉiam en la unua momento, kiam li libveriĝis el la korpo de la patrino. Dum tiu ĉi maniero de la nasko la korurgo ne bezonas hasti kaj havas eblon operacii trankvile. La anestazia efiko komenciĝas jam post 20 minutoj post enkonduko de nadloj. Dum imperiestra tranĉo la nadloj estas enpikataj en ok refleksaj punktoj /po du ili estas en supra kaj malsupra ekstremaĵoj, kvar estas en la abdomeno/. La refleksa terapio estas vaste uzata en nia klibiko. Ni ne aplikas iajn medikamentojn por la pacientinoj, kaj ni celas uzi la naturajn defendajn mekanismojn de ilia korpo. Por enpikado de la nadloj ni preventas senutilan prokraston de la naskiĝtago, kuracas toksikozojn - per la metodo de la refleksa terapio ni kapablas halti la naskajn kontraĵojn aŭ kontraŭe ilin provoki. Helpe de la nadloj estas la sendoloraj naskoj tute normalaj."

Helpe de la akupunkturo signife malleviĝis la nombro de la naskaj komplikaj kaj naskaj traŭmoj.

TETRACIKLINOJ - LA MOLEKULOJ KIUJ KURACAS

Sinonimoj de tetracikloj kaj nomoj de kuraciloj kiuj havas tetra ciklan kernon aŭ enhavas tetraciklan ingrediencon:

Aĥromicino, Ambramicino, Aŭreociklino, Aŭreomicino, Aŭreomikoino, Biociklino, Biomicino, Biostato, Bristaciklino, BVromtetraciklino, Ciklomicino Cirenilo, Deĥloraŭreomicino, Deĥlorbiomicino, Demstilĥortetetraciklino, Demtiletetraciklino, Diviomicino, Ditetraciklino, Doksacino, Doksiciklino, Doksipano, Doksitrekso, Dosilo, Duomicino, Embriostato, Geomicino, Geokortono, Glikomicino, Hidroksitetetraciklino, Hostaciklino, Ĥortetetraciklino, Ksantomicino, Novelciklino, Oksiciklosolo, Oksimikoino, Oskitetetraciklino, Oksiteracino, Optimicino, Olemorfociklino, Oletetrino, Panmicino, Parvidoksilo, Pirolidinometiltetraciklino, Policiklino, Reverino, Riomicino, Politetraciklino, Rondomicino, Saramicino, Sigmicino, Sinkromicino, Steklino, Tarĥocino, Terabono, Terakortilo, Teramicino, Terabono, Tetracino, Tetradecino, Tetrano, Tetraoleano, Turiciklino, Umetracilo, Velaciklino, Vĥibracino, Vĥibramicino, Vupeniciklino
M.T.Popov Berdjansk, USSR

CONSTANTIN I. ISTRATI /1850-1918/

rumana scienculo, kuracisto kaj pioniro de la Esperanto-movado en Rumanio

Constantin I. Istrati /pr. Konstantin I. Istrati/, la mondfama kemiisto kaj kuracisto, estis unu el pioniroj de la Esperanto-movado en Rumanio je la komenco de nia jarcento. En 1908 li estis elektita enkadre de la Rumana Federacio de Esperantistaj Societoj, kiel homora prezidanto. Constantin I. Istrati estis membro kaj pliposte ankaŭ prezidanto de la Rumana Scienca Akademio, profesoro kaj fondinto de la rumana organika kemia skolo enkadre de Universitato Bukareŝto en Rumanio. Samtempe li estis honora membro de la pli multaj fremdlandaj sciencaj societoj.

La Rumana Federacio de esperantistaj Societoj agadis en urbo Galati /pr. Galac/ kaj la tiama estro estis la elstara pioniro de nia landa Esperanto-movado H. Fischer. Constantin I. Istrati estis fervora apoganto de nia zamenhofa ideo. Lian opinion pri Esperanto

esprimis ankaŭ en la antaŭparolo de la lernolibro de D-ro Ŝaul Kimel /v. artikolon sur la 6-a p. en MIR, vol. II-a, N-ro 1, junio 1984/. Li skribis la 30-an de aprilo 1909 interalie jenajn vortojn! "Ni devas ĉiuj samtempe lerni Esperanton kaj ni devas esti dankemaj al iniciatintoj de propagando de tiu ĉi bela kaj facila internacia lingvo ĉe ni en Rumanio...! Li opiniis, ke Esperanto favoras al ekonomia progreso de nia patrujo kaj ni povas profiti tiun baldaŭe!

Rilate al scienca agado de K. I. Istrati mallonge" li esploris la naturajn mineralajn riĉecojn de Rumanio /salo, petrolo, sukceso, ezokerito, ktp./. Okaze de studado de la halogenaj, benzenaj derivaĵoj, li eltrovis pli novajn kolorigilojn, la t.n. franceŝinon kaj li izolis unu novan kemian substancon, la fiedelinon. K. I. Istrati estis aŭtoro de la lernolibro de kemio titolita "Elementa kurso de kemio", kiu aperis en 1891 kaj tiun tradukis ankaŭ en francan kaj hispanan lingvojn. Per sia verko "Relativa studo de la ĝenerala nomenklaturado en la organika kemio"/1913/, li faris valoran kontribuon fiksi la sicencan nomenklaturon. K. I. Istrati estis reprezentanto de la naturista-sciencia materialismo kaj li defendis la sixencan opinion rilate al unueco de la materio. Li batalis kontraŭ energetismo, fizika idealismo kaj agnostikismo en la naturaj sciencoj. K. I. Istrati disvolvis ankaŭ multflankan socian agadon enkadre de medicino, kulturo kaj scienco. Li fondis en 1890 la "Rumanan Sciencon Societon" kaj en 1902 ankaŭ la "Rumanan Societon por disvastiĝo kaj progreso de la scienco". Lia vivo kaj agado estu ekzemplodona por ĉiuj scienculoj-esperantistoj en la nuntempa Rumanio!

Adreso de la aŭtoro:

D-ro Gabor LAZAR, Cod 4055 Covasna, Rumanio, Str. St. Ceĉl Mare 26/A

HUMURAĴOJ

Profesoro demandas studentinon de medicino dum ekzameno:

"Kiam oni devas plej gardi la infanon?!"

"Ja, antaŭ ĝia koncipado, sinjoro profesoro".

Post kuracista esploro ĝojas paciento:

"Mi tre ĝojas, ke mi suferas pro la sama malsano kiel pesintjare, sinjoro doktoro!"

"Kion? Kaj kiel?"

"Ĉar mi tiam kaŝis ĉiujn medikamentojn, kiujn vi tiam preskribis al mi".

ANONCOJ

Ŝkolnik Feliks, 20-jara studento de medicino, Lokomotivnaja 16, A-22, SU-2140 001 Vitebsk /BSSR/ USSR - deziras korespondi kun gejunuloj el Ĉeĥoslovakio kaj alia mondo pri medicino kaj diversaj temoj /muziko, sporto, turismo, joko/ event. interŝanĝi bildkartojn, diskojn de la moderna muziko, librojn.

Fakdelegito de UEA por heraldiko serĉas libron de Walter Leonhard "Das grosse buch der wappenkunst" /Granda libro de la Blazonarto/, eld. Venlag Geerg D.W.Callway en FRG 1978. La kodnumero ISBN 3 7667 0345 5. Rekompence estas proponataj samvaloraj libroj pri pentroarto, aplikita arto aŭ aliaj laŭ deziro /ekzemple lasta novaĵo de Ĉeĥoslovaka Akademio de Scienco "Historio de Ĉeĥa plastikarto"/ Sciigoje atendas: Jaroslav Klement, kpt. Nálepky 7, CS-360 04 Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakio

